

Carl Hauptmann,
Silezia somero

tradukita de Manfredo Ratislavo

Nun somer' fariĝis,
Blovas varma vent'.
Helaĵ nuboj iras
Sur la firmament'.

Ili etendiĝas
Larĝe en aer'
Maturiĝas oraj
Spikoj sur la ter'.

La alaŭdo levas
Alten sin kun kant',
La aer' sonoras
Super varma land'.

Mi la sunan lumon
Trinkis en mizer',
Senrikolte, kvankam
Venis la somer'.

Larĝaj kampoj trinkis
Brilon de la sun'
El-etere meze
En la koron nun.

...

Plej profunde sonas
Songo en la sin',
Mi apenaŭ kaptas -
Antaŭsente ĝin.

*Traduko de la Germana poemo "Schlesischer Sommer" de CARL HAUPTMANN (Karlo Haŭptmano, *1858-05-11 – †1921-02-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1986-21-02.*

MR-199-2b / Arg-317-640 (2005-07-05 10:52:59)